Zamenhof-Tago / Esperanta Librotago
15-a de decembro



La 15-a de decembro estas la naskiĝtago de L.L. Zamenhof (1859-1917), kreinto de Esperanto. Laŭ iniciato de unu el niaj signifaj verkistoj, Julio Baghy, ni festas tiam ankaŭ la *Esperantan kulturon*. Por la plialtigo de la spirita nivelo de la esperantistaro, Baghy proponis ke la *Zamenhof-tago* estu ankaŭ la tago de la *Esperanta libro*.

Dum kultura evento lokaj grupoj informu ne-esperantistojn pri la internacia lingvo, ties abunda literaturo originala kaj tradukita. Ni elmontru, kiel nia movado disvastigas kulturverkojn de diversaj etnoj, ebligante al alilingvanoj la ĝuadon de verkoj alipopolaj.

Tio estu nia Zamenhof-taga kontribuo al justa, egalrajteca komunikado, kiu respektas lingvan, kulturan diversecojn, strebe al daŭripova konservado de tiuj riĉecoj, rajtoj.



Krom okazigo de kunvenoj, eventoj, prelegoj pri Zamenhof, tiutage ni celebru la Esperanto-literaturon ankaŭ per aĉeto, legado de nova libro!

Zorgantoj pri Informado de UEA

http://www.gazetaro.org/2016/librotago2016/

Afiŝoj: Peter OLIVER (grafiko) kaj tradukintoj el la tuta mondo.
Realigo de la agado fare de esperantistoj el multaj landoj
kun gvido de la teamo 'Zorgantoj pri informado' (ZPI).
Dankon al ĉiuj!